

bulteno
De Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze

N-ro 2/2005 (174)

Září / septembro 2005

Z obsahu – el la enhavo:

La aktivadoj de nia klubo	2
P. Zemanová: Vespero en siluria maro	3
B. Němcová: Diablo kaj Kača	4
Z. Bergrová: Infanoj de la respubliko	7
Fr. Lazecký al Jiří Karen	12
J. Karen: El Eternaj revuloj	13
Sendu ĝin pluen	14
Č. Vidman: Firemní hymna	16
J. A. Komenský o mezinárodním jazyku	18
T. Sasaki: Esperanto jako jazyková učební pomůcka	19
C. Piron: Z projevu u příležitosti 100. výročí prvního světového kongresu esperanta v r. 1905	21

La regulaj kunvenoj de la Esperantista Klubo en Praha okazas en la kunvenejo en Praha 1, Ve smečkách 25, ĉiuĵaŭde de la 14-a ĝis la 16-a horo.
Post la somera libertempo la unua kunveno okazos ĵaŭde la 8-an de septembro 2005.

Jubilejní 90. Světový kongres esperantistů

se konal ve dnech 23. – 30. Července 2005 ve Vilniusu v Litvě, za účasti více než 2300 osob ze 70 zemí. Čestnou záštitu nad kongresem převzal prezident Litevské republiky Valdas Adamkus. Mezi čestnými hosty na tribuně byl i český velvyslanec v Litvě. Hlavním tématem jednání kongresu bylo: *100 let komunikace mezi kulturami*. První světový kongres esperantistů se konal právě před 100 lety v roce 1905 ve francouzském přístavním městě Boulogne-sur-Mer, za účasti tvůrce esperanta dr. Ludvíka Lazara Zamenhofa. Litevská pošta vydala u příležitosti kongresu poštovní známku s portrétem L. L. Zamenhofa. Každodenní reportáže a rozhovory z kongresu vysílalo Radio Polonia, Varšava, a stručné zpravodajství také Čína Radio Internacia, Peking. Obě stanice nadále vysílají zvukové záznamy a rozhovory z kongresu.

La aktivecoj de nia Esperantista Klubo fine de la jaro 2004 kaj komence de la jaro 2005.

La kunvenoj de nia klubo okazis regule ĉiujŝaŭde posttagmeze – escepte de la somera paŭzo en julio kaj aŭgusto 2004 – en la kunvenejo en la strato Ve Smečkách n-ro 25, proksime de Venceslaa placo, la centra placo de Prago.

Dum la kunvenoj okazi softe prelegoj pri diversaj temoj, ekz. pri la geologio kaj mineralogio (Pavla Zemanová, Ing. Trojan), pri misteraj rondoj sur grenkampoj (Ing. Turková), pri manipulado de homoj (D-ro Adámek), pri la edzinoj de niaj prezidentoj (Jindřich Ondráček); ĉiu unua kunveno en monato estis dediĉita al iu nia E-verkisto, kiel J. Karen, Ĉ. Vidman, Z. Bergrová, E. Urbanová, H. Fílová, P. Zemanová k. a. (Jiří Patera).

Pragon vizitis kelkaj eksterlandaj geesperantistoj, ĉu survoje al UK en Vilno, aŭ revenvoje de la junulara kongreso en Zakopane.

Plu daŭris la kunlaboro de nia klubo kun la Asocio de esperantistoj-handikapuloj. Okazis seminarioj dum lastaj sabatoj de monato en nia kunvenejo, partopreno de niaj membroj en la printempa kaj aŭtuna seminarioj en Skokovy kaj en la internacia renkontiĝo de esperantistoj – handicapuloj en Pardubice-Rybitví kaj dum la XV-a E-tago de E-klubo de d-ro Schulhof en Pardubice en aŭgusto 2004.

D-ro Petr Chrdle partoprenis kaj la UK en Pekino, kaj la UK en Vilno. En Pekino fariĝis honora membro de UEA la praga nevidanta esperantisto s-ano Jiří Vychodil. La Universalan Kongreson en Vilno partoprenis multaj ĉeĥaj geesperantistoj, ankaŭ membroj de nia klubo en Bratislava en 2004 partoprenis s-anino Zubová, kelkaj membroj partoprenis la konferencon KAEST 2004 en Dobřichovice kaj la solenaĵojn de la Centjariĝo de la E-klubo en Plzeň la 20-an – 22-an de majo 2005.

Nia poetino Eli Urbanová, la honora membro de UEA kaj de ĈEA, prezentis sin denove en la Ĉeĥa Televido la 29-an de oktobro 2004. Ŝi rakontis pri sia vivo kaj montris kaj deklamis siajn poemojn.

La membrino de nia klubo Pavla Zemanová ricevis la 2-an premion en literatura konkurso organista de E-klubo „D-ro Ivan Kirĉev“ en Razgrad, Bulgario, pro humuraĵo „Sen nomo“.

La 1-an de novembro 2004 okazis en la Kulturdomo Vltavská solena posttagmeza programo – Renkontiĝo kun la poeto Ĉestmír Vidman – dum kiu la teatra societo Kostumo el Příbram prezentis montraĵojn el lia poemaro „Notlibro de Darkov“. La programo fariĝis bonega poresperanta propagando inter la neesperanta publiko.

Okazos pluraj literaturaj vesperoj de la ĉeĥa poetino Věra Ludíková, en kiuj estis prezentitaj verkoj de ŝi verkitaj kaj redaktitaj, kaj nome „Sendu ĝin pluen II“ kaj „Sendu ĝin pluen III“, en kiuj ne mankis Esperanto. Unu vespero okazis la 20-an de oktobro en la Henrika Turo en Prago, en la Henrika strato, la aliaj la 14-an de decembro 2004 en la Galerio La vojo de lumo, la 21-an de marto en Náprstek-muzeo kaj la 5-an de aprilo denove en la Galerio La vojo de lumo. En ĉiuj vesperoj brile deklamis E-lingve s-ano J. Vích.

La eldon-agado de la firmao KAVA-PECH de Petr Chrdle estas ĉiam pli granda kaj rapida. Aperis la nova eldono de la Plena Ilustrita Vortaro PIV 2005, la kompleta traduko de Ŝvejk fare de Vladimír Váňa, la preleg-kolektoj de la konferencoj OSIEK 2003 kaj KAEST 2004, Arne, la ĉefido, rakonto de Leif Nordenstorm, Zamenhofova ulice, la ĉeĥa traduko de La Zamenhof-strato de R. Dobrzyński kaj L. C. Zaleski-Zamenhof, fare de Jiří Patera, La Taglibro de mia frato de Ĥ. Pressburger en traduko de Věra kaj Vlastimil Novobilský k. a.

La junularo gvidata de Tomš Břicháček plu aktivas, precipe en la interreto. En la televida konkurso „Riskuj“ Tomáš gajnis unu premion. Gratulon!

En januaro 2005 aperis poŝt-folio kun poŝtmarko pri Petr Ginz, la juna esperantisto, kiu pereis en la nazia koncentrejo. Lian bildon de luna pejzaĝo kunportis en la kosmoŝipon Columbia la israela kosmonaŭto Ilan Ramon, sed la kosmoŝipo kraŝis dum la revenvojo el la Tero. La Internacia Astronomia Unio donis nomoc al asteroido „Petr Ginz“ kaj nia klubo sendis peton al la praga magistrato, ke unu el novaj pragaj stratoj estu nomita „Petr Ginz – strato“ – dume sen magistrata respondo.

La 14-an de junio 2005 kelkaj geklubanoj partoprenis ekskurson, kiun organizis la kluba prezidanto Ing. Trojan. Ni vizitis la urbeton Jílové, en kies muzeo estas granda ekspozicio pri orminado, kiu antaŭ jarcentoj floris tie. De tie per aŭtomobiloj de Ing. Trojan, Ing. Turková kaj V. Stibůrek el Benešov ni veturis al Dolní Studený, kie ni vizitis Mingalerion de Sankta Jozefo, en kiu ni povis konvinkiĝi, kiel peza estis la laboro de la tiamaj orministoj. En la vilaĝo Pikovice ni tagmanĝis en zarděna restoracio apud pensiono „Feo“ (la pensiono vere posedas tiun Esperantan nomon) kaj tie, apud la ponto trans la rivero Sázava ni fine komencis akiri la oron per or-lavado. S-ano Trojan disdonis al interesuloj patojn por orlavado kaj instruis, kiel manipuli ilin kaj kiel el sablo airi Veron orerojn. Ĉiujn ĝojis pro la trembrilado en la sablo, sed bedaŭrinde temis nur pri glimo. Tamen post duhora laboro du – tri or-eroj estis vere trovitaj. Post tiu peza laboro ni tre volonte akceptis la regalajon en la somerdomo de s-ano Trojan en la vilaĝo Chlomek, kion por ni preparis la edzino de nia prezidanto. Li dume montris al ni sian kolekton de mineraloj kaj fosilioj, inter ili la famajn trilobitojn.

Pavla Zemanová

Vespero en siluria maro

Super kvietaj neprofunda golfo de la varma siluria maro malrapide krepuskiĝis. Vivsignoj sur la fundo sinsekve estingiĝis tiom, kiom la duonlumo estis transiranta en mallumon. Ĉion el sia kaŝejo observis trilobito, duone mergiĝinta en sia ŝlimkavaĵeto. Ĝenerala kvieto, eleganta inter tago kaj nokto, instigis ĝin forŝoviĝi el la ŝlimo. Estos necese trovi alian sendanĝeran lokon, promesantan sufiĉe da nutraĵo. Tie eblos trapasi la sekvan tagon. La trilobito malrapide kaj singardeme transpaŝis argilfundan ondon. La nokta vivo ĝis nun ne komenciĝis, dum la taga vivo prepariĝis al dormo. Pro la kvazar kvieto senzorgigita, la trilobito ne rimarkis per siaj etaj okuloj grandegan ombron super si, nome la mortigan danĝeron por ĉiuj malpli grandaj animaloj. Tamen instinkte ĝi subkomprenis, ke io pertusis la senmovecon de la duonlumo. Subita doloro kaj grincado, kiuj kaŭzis akra pinĉilo, por momento senigis la trilobiton de kapableco defendi sin. Post mallonga tempo ĝi tamen mobilizis sian vivenergion por trovi fuĝi. Ĝiaj muskoloj penegis, la korpo tordiĝis, sed la fortoj rapide malpliĝis. Ankoraŭ lasta provo kaj – finfine libero. La kunpremo fare de la pterigoto malstreĉiĝis. Rapide for en kaŝejon! La trilobito, tute elĉerpita, ŝoviĝis en argilon kaj ĝiajn sensojn vualis nebuloj de trolaciĝo. Restaĵoj de vivo el ĝi forpasis kaj la korposuko sorbiĝis en la argilon.

Super la kveta neprofunda golfo de la siluria maro denove aperis la suno, kies radioj tralumigis la medion. La trilobito vundita per la pinĉiloj de la pterigoto nenion plu vidis, sed ĝia korpo, eĉ tra abismo da tempo, restis kiel atestaĵo de la prateta vivo por ni, la nuntempuloj...

pterigoto – rŭznorep (laŭ d-ro Kavka)

Božena Němcová

Diablo kaj Kaĉa

En iu vilaĝo estis maljuna servistino, nomata Kaĉa. Ŝi havis dometon, ĝardenon kaj al tio ankoraŭ kelkajn orajn monerojn, sed se ŝi tuta e noro sidus, eĉ la plej malriĉa fraŭlo ne edziĝus al ŝi, ĉar ŝi estis kiel diablo malbona kaj kverelema. Ŝi havis maljunan patrinnon kaj fojfoje ŝi servos bezonis sed eĉ se krejĉero iun povus savi kaj ŝi per dukatoj pagus, neniu eĉ bagatelaĵon faru spor ŝi, ĉar ŝi tuj pro ĉiu vorto disputis kaj kvetlis, ĝis tio estis je cent metroj aŭdebla. Al tio ĉio ŝi ne estis bela kaj tial ŝi restis fraŭlino, ĝis ŝi estis preskaŭ kvardekjara. Kiel kutime en vilaĝoj estas, ke ĉiudimanĉe posttagmeze estas muziko, okazis ankaŭ ĉi-loke; kiam aŭdiĝis ĉe vilaĝestro aŭ en gastejo sakfajfilo la ĉambro estis tuj plena de junuloj, en antaŭĉambro kaj sur trotuaro staris junulinoj kaj ĉe fenestroj infanoj. Sed la plej frua inter ĉiuj estis Kaĉa; la junuloj al junulinoj kapsignis kaj tuj moviĝis al la danĉplaco, sed Katerina – tio estis ŝia nomo, nur moke oni diris al ŝi Kaĉa – dum sia tuta vivo tiun bonŝancon eĉ unufoje ne havis, kvankam al la sakfajfisto ŝi eble mem ŝatus pagi, tamen spite al tio ŝi ne ellasis eĉ unu dimanĉon. Unu fojon ŝi iras ankaŭ kaj dumaje ŝi pensas: „Tiom aĝa mi jam estas, sed kun knabo mi ankoraŭ ne dancis, ĉu tio ne estas kolerinda? Vere, hodiaŭ mi Dance eble kun diablo.“

Kolerplena ŝi venas en la gastejon, eksidas ĉe hejtforno kaj rigardas, kiu kiun al danco prenas. Subite eniras tra pordo sinjoro en arbarista vesto, sidigas sin nemalproksime de Katerina ĉe tablon kaj mendas trinkaĵon. Servistino alportas bieron, la sinjoro ĝin prenas kaj portas al Katerina por tosti. Katerina momenteton enmense miris, ke la sinjoro esprimas al ŝi tian honoron, momenteton ŝi honime hezitis, sed fine ŝi volonte ektrinkis. La sinjoro la kruĉeton surtabligas, elpoŝigas dukaton, ĵetas ĝin al la sakfajfisto kaj krias: „Solon, knaboj!“ Junuloj faras lokon kaj la sinjoro prenas Kaĉan por danci.

„Kia strangaĵo, kiu li estas?“ demandas malujunuloj kaj kunigas la kapojn; junuloj grimacas kaj junulinoj kaŝas la kapojn unu post alian kaj kovras la buŝojn per antaŭtuko, por ke Kaĉa ne rimarku, ke ili mokas ŝin. Sed Kaĉa vidis neniun, ŝi ĝojis, ke ŝi dancas, eĉ se la tuta mondo mokus ŝin, por ŝi tio neniom gravus. Tutan posttagmezon, tutan vesperon dancis la sinjoro nur kun Kaĉa, aĉetadis marcipanon kaj ankaŭ dolĉan vodkon, kaj kiam venis la tempo por iri hejmen, li akompanis ŝin tra la vilaĝo.

„Mi deziras, ke mi povu ĝismorte danci kun vi kiel hodiaŭ,“ diris Kaĉa, kiam ili estis disirontaj.

„Do tio povas okazi al vi, iru kun mi.“

„Kaj kie vi loĝas?“

„Prenu min ĉirkaŭ la kolo, mi tion diros al vi.“

Kaĉa kaptis lin, sed en tiu momento la sinjoro transformiĝis en diablon kaj forflugis kun ŝi rekte en la inferon. Ĉe pordego li haltis kaj Frans, kamaradoj venis, malfermis kaj vidante la kunulon, ke li estas tute elĉerpita, ili volis senpezigi lin kaj Kaĉa depreni de li. Sed ŝi tenis sin kiel iksodo kaj per neniu forto ŝi lasis sin fortiri; vole-nevole devis la diablo kun Kaĉa surdorse iri al la sinjoro Antikristo.

„Kiun vi portas?“ demandis lin la sinjoro.

Kaj tiam rakontis la diablo, ke irante sur la tero li ekaŭdis la ĝemon de Kaĉa pro dancanto, kaj intendante ŝin iom timigi, li ekdancis kun ŝi kaj poste por momento li vojs montri al ŝi ankaŭ la inferon. „Mi ne scias,“ li finis, „ke ŝi ne volos min delasi.“

„Ĉar vi estas stultulo kaj instruojn miajn vi ne memoras,“ vortatakis lin la maljuna sinjoro. „Pli frue, ol vi ekrilatos kun iu, vi devas koni liajn intencojn; se vi pri tio ekmemorus, kiam Kaĉa akompanis vin, vi ne kunportus ŝin. Nun malaperu el mia vidkampo kaj penu senigi vin de ŝi.“

Plena de ĉagreniĝo ŝoviĝis la diablo kun la fraŭlino Katerina sur la teron. Li promesis al ŝi orajn montojn, verdajn valojn, se ŝi lasos lin, li malbenis ŝin, sed ĉio neniel utilis. Plenlacega, kolerplena li venas kun sia ŝarĝo sur iun herbejon, kie juna ŝafpaŝtisto en grandega peltmantelo volvita ŝafojn paŝtis. La diablo transformiĝis en ordinaran homon, kaj tial la ŝafpaŝtisto ne rekonis lin. „Kiun do vi portas, amiko?“ li demandas familiare la diablon.

„Aĥ, kara homo, apenaŭ mi spiras. Imagu, mi iris mian vojon pri nenio pensante, jen saltas tiu ĉi virinaĉo sur mian dorson kaj neniel volas de mi desalti. Mi volis porti ŝin en la plej proksiman vilaĝon kaj tie ŝin iel formel, sed mi ne estas kapabla, miaj kruroj malfortiĝas sub mi.“

„Nu, atendu iom, mi helpos vin de tiu trudulino, sed ne longe, ĉar mi devas ree paŝti; almenaŭ por duona vojo mi forportos ŝin.“

„Mi tre ĝojos.“

„Ĉu vi aŭdas, vi, kaptu min,“ kriis la ŝafpaŝtisto al Kaĉa.

Apenaŭ tion Kaĉa ekaŭdis, ŝi delasis la diablon kaj kaptis la vilan peltmantelon. Nun la svelta paŝtisto portis grandan pezon, Kaĉan kaj la terure grandan magelon, kiun li matene prunteprenis de kortmastro. Sed ĝi baldaŭ komencis tedi lin kaj li ekpensis, kiel senigi sin de Kaĉa. Li venas al fiŝlago, kaj jen li havas ideon ĵeti ŝin tien. Sed kiel? Se li povus la peltmantelon eĉ kun ŝi demeti. Ĝi estis sufiĉe malstrikta kaj tial li malrapide provis, ĉu eblus demeti ĝin. Kaj jen, li eltiras unu brakon, Kaĉa scias nenion, li eltiras la alian, Kaĉa ankoraŭ scias nenion, li demetas la unuan maŝeton de butono, li forigas la duan, la trian kaj plaŭd – Kaĉa kuŝas en la fiŝlago eĉ kun la peltmantelo.

La diablo ne iris post la ŝafpaŝtisto, li sidis sur kampolimo kaj paŝtis ŝafojn, rigardante ĉu la paŝtisto kun Kaĉa baldaŭ revenos. Li ne devis longe atendi. Kun la malseka mantelo surŝultre rapidis la ŝafpaŝtistino al la herbejo opiniante, ke la fremdulo jam estas eble ĉe la vilaĝo kaj la ŝafoj restis solaj. Kiam ili ekvidis sin reciproke, ili rigardis unu la alian. Diablo, ke la ŝafpaŝtisto iras sen Kaĉa, kaj la paŝtisto, ke la sinjoro tie sidas plu. Kiam ili ekparolis, diris la diablo al la ŝafpaŝtisto: „Mi dankas al vi, vi faris al mi grandan servon, ĉar mi devus probable ĝis la lasta juĝo porti Kaĉan. Neniam mi forgesos pri vi kaj iam mi riĉe rekompencos vin. Sed por ke vi sciu, al kiu vi helpis el mizero, mi diros al vi, ke mi estas diablo.“ Tion li findiris kaj malaperis. La ŝafpaŝtisto restis momenton stari kiel senkonsciigita, poste li diris al si: „Se ĉiuj diabloj estas tiom stultaj kiel li, tiam estas bone.“

En tiu lando, kie vivis la ŝafpaŝtisto, regis juna princo. Riĉaĵojn li havis multajn; estante libera mastro super ĉio, li ĝuis ĉin plenmezure. Tagon post tago li ĝuis la plezurojn, kiujn nur la mond povas disponigi, kaj kiam venis nokto, el la princaj salonegoj aŭdiĝis kantado de senbridaj diboĉemaj junuloj. La landon administris du intendantoj, kiuj ne estis pli bonaj ol la princo mem. Kion ne fordiboĉis la princo, lasis al si ili du, kaj la povra popolo ne sciis, kie preni pluan monon. Kiu havis belegan filinon aŭ monon, tiu ne havis feliĉan tempon, ĉar kun certeco li povis atendi ordonon, ke la princo tion plejrajte por si postulos, kaj dio favoru tiun, kiu lian volon oponus! Kiu povus tian reganton ami? Tra la tuta lando la popolo malbenis la princon kaj la landintendantojn. Iun tagon, ne sciante pluk ion pensi, la princo venigis astronomon kaj ordonis, ke li al li kaj al la du intendantoj legu planedojn. La astronomo obeis kaj esploris en la steloj, kian finon havos la vivo de la tri prodigemuloj.

„Pardonu, princa Moŝto,“ li diris fininte la esploradon, „al via vivo kaj ankaŭ al viaj intendantoj minacas tia danĝero, ke mi timas tion eldiri.“

„Nur parolu, ĝi estu kio ajn! Sed vi devas resti ĉi tie kaj se ne plenumiĝos viaj vortoj, vi perdos vian kapon.“

„Mi tre volonte subigas min al via justa ordono. Aŭskultu do: antaŭ ol estos la dua lunkvarono, venos por ambaŭ intendantoj diablo, je tiu kaj tiu horo, je tiu kaj tiu tago, kaj dum la plenluno li venos ankaŭ por vi, princa Moŝto, kaj ĉiujn vin tri vivantajn li en inferon forportos.“

„En prizonon forkonduku tiun ĉi mensogan ĉarlatanon!“ ordonis la princo kaj la servistoj faris laŭ la ordono. En la koro ne sentis sin bone la princo, kiel li ŝajnis; la vortoj de la astronomo skuis lin kiel juĝa voĉo. Unuafoje aŭdigis sin en li la konscienco! La intendantojn oni forveturigis hejmen duonmortajn, neniu el ili ion manĝis. Preninte ĉiun sian havaĵon ili sidiĝis en veturilojn, forveturis en siajn bienojn kaj ordonis la kastelán de ĉiuj flankoj ĉirkaŭbari, por ke diabloj ne povu veni por ili. La princo konvertiĝis al la ĝusta vivo, li vivis silente kaj trankvile kaj iom post iom li komencis administri la landon esperante, ke verŝajne tamen la kruela sorto ne plenumiĝos.

Pri tiuj ĉi aferoj la malriĉa ŝafpaŝtisto havis neniun ŝajnon; ĉiutage li paŝtis sian gregon kaj zorgis neniom, kio okazas en la mondo. Iun tagon subite staras antaŭ li la diablo kaj diras al li: „Mi venis, paŝtisteto, por rekompenci al vi vian servon. Kiam estos la lunkvarono, mi devos forporti en la inferon la iamajn landintendantojn, ĉar ili priŝteladis la malriĉan poklon kaj la la princo ili malbone konsilis. Sed ĉar mi vidas, ke ili pliboniĝos, mi lasos ilin ĉi tie kaj ĉe tio mi tuj rekompencos vin. Kiam estos tiu kaj tiu tago, eniru en la unuan kastelon, kie estos multe da homoj. Kiam en la kastelo komenciĝos krédo, servistoj malfermos pordegon kaj mi gvidos for la mastron, do tiam alpaŝu al mi kaj diru: „Foriru ĉi-momente, aŭ estos malbone!“ Mi obeos vin kaj iros. Sed post tio igu la mastron doni al vi du sakojn da oro, kaj se li ne volos, diru nur, ke vi alvokos min. De tie iru al la dua kastelo kaj faru same kaj la saman pagon postulu. Sed kun la mono bone mastrumu kaj utiligu ĝin por bono. Kiam estos la plenĉeno, mi devas forporti la princon mem, sed mi ne rekomendas al vi liberigi lin, ĉar vi devus propran haŭton oferi.“ Tion li findiris kaj foriris.

La ŝafpaŝtisto memoris ĉiun vorton. Kiam estis la lunkvarono, li maldungiĝis kaj iris al la kastelo, kie unu el la du intendantoj loĝis. Li venis tien ĝustatempe. Homamasoj staris tie kaj rigardis, ke diablo la sinjoron portos. Jen aŭdiĝas en la kastelo malespera kriego, la pordego malfermiĝas kaj nigra diablo tiras la mastron je la mano kaj la diablon forŝovinte vokas: „Foriru aŭ estos malbone al vi!“ Tiumomente la diablo malaperas kaj la ĝojanta mastro kisas la manon de la paŝtisto demandante lin, kion li postulas rekompence. Kiam la paŝtisto diris, ke du sakojn da oro, la mastro ordonis, ke oni tuj tiun kvanton donu al li.

Kontenta iris la ŝafpaŝtisto al dua kastelo kaj tie ankaŭ same bone kiel ĉe la unua li sukcesis. Estas memkompreneble, ke la princo sufiĉe rapide eksciis pri la ŝafpaŝtisto; ĉar li cetere ĉiam demandadis, kiel la mastroj finiĝis. Kiam li ĉion tion ekaŭdeis, li sendis veturilon kun kvar ĉevaloj por la kara ŝafpaŝtisto kaj kiam oni alveturigis lin, li insiste petis lin, ke li kompatu lin kaj el la inferaj ungegoj liberigu lin.

„Mia sinjoro,“ respondis la ŝafpaŝtisto, „tion mi promesi al vi ne povas; temas ĉi-foje pri mi. Vi estas granda pekulo, sed se vi volus plibonigi vin, juste kaj saĝe vian popolon regi, kiel por princo decas kaj konvenas, mi provus fari tion, eĉ se mi mem anstataŭ vi devus iri en la ardantan inferon.“ La princo kun klara menso ĉion promesis kaj la ŝafpaŝtisto foriris, promesinte al li, ke en la certa tago li aperos.

Kun timo kaj teruro oni ĉie atendis la plenlunon. Kiel oni komence tion deziris al la princo, tiel oni lin nun kompatis, ĉar ekde tiu momento, kiam li pliboniĝis, neniu povis deziri al si pli bonan princon. Tagoj pasas, eĉ se oni ilin kun ĝojo aŭ kun ploro kalkulas! Antaŭ ol la princo atendis, sur la sojlo estis la tago, en kiu li devis adiaŭi ĉion, kio lin ĝojigis. Nigre vestita, tute mutanta, sidis la princo kaj atendis aŭ la ŝafpaŝtiston, aŭ la diablon. Subite malfermiĝas la pordo kaj la nigra diablo staras antaŭ li.

„Preparu vin, moŝta princo, la tempo forfluis, mi estas ĉi tie por vi.“

Eĉ vorton ne respondente la princo leviĝis kaj paŝis post la diablo en la korton, kie senmezura kvanto da homoj staris. Jen tra la amaso faras al si vojn la ŝafpaŝtisto tute elĉerpita kaj kuras rekte al la diablo, vokante de malproksime: „Forkuru, forkuru, aŭ vi finiĝos malbone.“

„Kiel vi povas aŭdaci min reteni? Ĉu vi ne scias, kion mi diris al vi?“ sufloris la diablo al la paŝtisto.

„Frenezulo, ne temas pri la princo, sed pri vi. Kaĉa vivas kaj demandas pri vi.“ Kiam la diablo ekaŭdis pri Kaĉa, tuj li malaperis kaj lasis la princon trankvila. La ŝafpaŝtisto enmense mokis lin kaj ĝojis, ke per la ruzo li liberigis la princon. Pro tio la princo neumis lin sia la plej unua kortegano kaj kiel propran fraton li amis lin. Sed li ankaŭ bone decidis, ĉar la malriĉa paŝtisto estis sincera konstanto kaj prava kortegano. El la kvar sakoj da oro li retensi al si eĉ ne krejceron; li helpis per ĝi al tiuj, de kiuj la intendantoj ĝin ekspluate gajnis.

Esperantigis Jiří Patera

Zdenka Bergrová

Infanoj de la respubliko

Mi havas kvin jarojn, estas do la jaro 1928-a. Mi stara sen noktoĉemizo super helica ŝtuparo kaj konvulsie tenas min je panjo kaj ĉe la alia flanko je paĉjo. Ni ne estas en la koridoro solaj. Apud ni staras la geedzoj Kočí kun Tonjo, ŝi estas je unu jaro pli aĝa ol mi, la geedzoj Hruška sen bebo, kun dume la rumoro ne vekis, premas sin ĉi tie ankaŭ la geedzoj Kříž. Malsupre sub la ŝtuparo de unuetaĝa anguldometo, kie ni loĝas, furiozas ebrulo.

„Kiu estas ĉi tie la mastro, mi estas ĉi tie la mastro,“ li kriegis kiel rabia. Li estas la domposedanto.

Tiam regis la sama loĝejmanko kiel nuntempe. Ĉi tie paĉjjo trovis nian unuan propran loĝejon. La dometo estis multe kadukaspekta jam en la jaro 1928, kaj miaopinie iam en julio 1988 oni montris ĝin en la televido kiel ekzemplon de malzorgado pri loĝej-fonduso. Ĝis nun ĝi karkas plu.

Dume ankaŭ mi maljuniĝis.

Antaŭ nelonge mi troviĝis proksime de ĝi.

Mi enpaŝas internen kaj iras sur la helica ŝtuparo en malhelan koridoron de la unua etaĝo. Tiu ĉi pordo iam kondukis en nian loĝejon. Mi hezitas, ĉu mi frapu, sed la pordo subite mem malfermiĝas, eliras el ĝi eble dudekjara, okulfrape vestita fraŭlino kun dukolora hararo. La pordon si tuj brufermis, sed mi tamen sentas ekblovon de ŝimaĵo kaj de neklara delongtempeco.

„Ĉu vi serĉas iun?“ frape demandas la fraŭlino.

„Ne, ne,“ mi balbutas, sed kiam mi estis malgranda, ni loĝis en via loĝejo.“

„Hm,“ ŝi elbuŝigas. „Tio ne estas ebla, ni loĝas ĉi tie de ĉiam.“

Eĉ momenton ŝi ne restas, ŝi traflugas pretere kaj jam ŝi estas el la domo.

Tio rememorigas al mi malnovegan historieton, kiam mi rigardis la geedziĝan fotografajon de miaj gepatroj. Ne estas tie multaj homoj, sed tamen nur –

„Kie estas mi?“ mi seniluze demanda. „Mi ne povas trovi min tie.“

„Tiam ni ankoraŭ ne havis vin,“ ekridas panjo.

„Ne, ne, vi havis min ĉiam,“ mi mienas plore. Kaj panjo penas konsoli min.

En la jaro 1928 ni loĝas en ĉambro kaj kuirejo sen akcesoraĵoj, en la domo ni estas la plej riĉa malriĉularo. La maljunaj geedzoj Kříž havas plenkreskajn infanojn, Alojzon, Cirilon kaj Marian, kaj ili ĉiuj loĝas en unu ĉambro. Ilia plej aĝa filino Beta edziniĝis en Bremeno, origine ŝi forveturis tien por trovi postenon de servistino. Ŝi konatiĝis kun Mefisto sinjoro Maschmayer, ili geedziĝis kaj pli poste transloĝiĝis en Pragon. Loĝejon ili trovis en la kvartalo Pankrác en malalta balkondomo proksime de la tria pordego de Vyšehrad.

Kaj ni jam baldaŭ ankaŭ loĝos en Benš-strato en Pankrát, en komuna koridoro kun ĉiuj najbaroj de la domo de Krč. Dume ni suferas pro la oftaj diboĉaĵoj de la ebria domposedanto kaj ĉiutage, post kiam paĉjo foriras perpiede en presejon ĝis la kvartalo Hradčany en la antikva Písek-pordego, kie li estas dungita kiel komponisto, panjo preparas por vojaĝo iom malpli longa ankaŭ min kaj la infanĉaron kun nia ĵus naskiĝinta Jarmila.

Ni iras al Vyšehrad, kie ni loĝis ĝis mia kvara jaro en ĉambreto de miaj geavoj. La kuirejton tenis por si la geavoj kun pli aĝa frato de la patrino, Oldro. Kaj en la tuta unuĉambra loĝejo, nome kun antaŭĉambro, provizejo kaj necesto, sed sen banĉambro, mi peklas preskaŭ tutan tagon kun naŭ gekuzoj. Kvar knaboj, kvin knabinoj, mi la deka.

Mia vivo neniam distingiĝis per lusko, sed mia patrino vivis multe pli peze, ĉefe pro tio, ke ŝi neniam kapablis apartiĝi de la mizero de Vyšehrad, kaj la vivo de mia avino de Vyšehrad estas morna tenebro. Ŝi havis ok infanojn, postvivis ŝin nur du filinoj, Anna kaj Milada, mia patrino.

Nia ĉambro en Vyšehrad kadras mian unuan rememoron. Ĝi estas mallonga kaj iom drola. Paĉjo portas min enbrake tien kaj reen kaj kantas. Li estas alta kaj mi atendas, kiam li denove puŝfrapos lustreton kun perpendikla randaĵo, sur kiu estas pentritaj flavaj citronoj, inter ili girlandoj da egida verda foliaro... Paĉjo malfortigas la voĉon, sed kantas vervajn soldatmarŝojn, li ne scipovas aliajn lulkantojn. Se li ne revenus el la unua mondmilito, mi ne havus patron. Tial mi statis tre bone. Li estas bona, fortika, li estas en ĉio fidinda. Ĝi estas granda sekureco.

Aŭ ke mi plej malnova rememoro estus la sunsubiro, kiun mi rigardas el malgranda balkoneto? Ho ne, tiam mi jam estis pli granda, kiam mi ŝovadis skabelon el la kuirejo sur la balkoneton por vidi trans la ŝtona parapeto malsupre la Vratislav-straton ĝis tie, kie malantaŭ la fervoja viadukto flagretis la okcidenta vesperruĝo. Vultavo estis kaŝita malsupre, nur supozata, sed mi sciis pri ĝi. Do tiam mi jam vere estis iom pli aĝa. Kaj mi rigardis al la okcidento ofte, tial mi tion bone memoras.

Panjo estis tute alia ol paĉjo, kvazaŭ ŝi senĉese ion timus. Tio min strange emociigis.

„Ci falos, ne moviĝu!“ ŝi vokas ĉiumomente. Kaj mi kliniĝas tiom pli, iam por vidi la okcidenton, aliam por povi respondi al la eble samaĝa knabo, kiu mansvingas al mi kaj vokas el subtegmento de la malalta kontraŭa dometo.

Restaĵo de malnova konstruaĵo elstaris tie en la straton, pro kelkaj tiaspecaj la strato estis zigzaga. Poste oni la dometon malkonstruis kaj konstruis tie altan domon. Sed la knabo ne loĝis en ĝi, kien li malaperis, mi neniam eksciis.

Mi memoras ankaŭ ambaŭ miajn onklojn. Jozefo, la patro de ses infanoj, mortis, kiam mi estis dujara. Li venis iam en la kuirejon kaj post kiam mi aŭdis liajn paŝojn, mi kaŝis min inter telerŝranko kaj ŝranko, kaj ĉar li tion evidente rimarkis, li diris:

„Kie estas la malgranda fringelo?“ Kaj mi elrigardis kaj ridis.

Post la onklo Jozefo georfiĝis kvar kuzoj kaj du kuzinoj, kaj ĉar ilia patrino mortis ankoraŭ pli frue, ili estis kompletaj georfoj. Post tio loĝis kun ili en malluma teretaĝa loĝejo, ankaŭ en la Vratislav-strato, nur iom pli Malaze, ilia avino Skalská. Ŝi iradis kun lambastonoj. Mia avino, Charvátová, zorgis pri ili alimaniere, ili tagmanĝis kaj vespermanĝis ĉe ni.

La avino entombigis kvar siajn infanojn malgrandajn, du filojn plenkreskajn, ili ambaŭ estis trideknaŭ-jaraj, kiam ili baldaŭ unu post alia mortis. La avino estis justama, sed mi ne ankoraŭ ne kapablis kompreni, kial ŝi disdivids ĉiujn suĉbombonojn inter la infanoj de Jozefo, kaj al mi ŝi ŝovis nu runu. Suĉbombono estis mia sopko, la gepatroj ne donis ĝin al mi. Kial do la avino tiel flankklasas min? La ruĝan malmolan frambon mi ne prenis, mi forkuris en la ĉambron, kaŝis min post kahelan fornon kaj korŝire plorsingultis. Mi ja ĉiam disrompis ĉokoladon al tiom da pecetoj, kiom da infanoj estis ĝuste en la kuirejo, do kial nur, kial la avino tiom flankklasas min. Al neniu mi pri tio diris, sed mi sentis tion kiel malhonorigon.

La onklo Oldro estis laŭ mi justama. Tiu donadis sukeraĵojn al ĉiuj egale. Li estis handikapulo, li kavis kurban dorson, li mortis en la lasta jaro de nia vivo en Vyšehrad. La avino persisteme riproĉis al la sorto, ke mortis ses ŝiaj infanoj, kaj ŝi ankoraŭ vivas. Etulojn falĉis en tiuj malnovaj tempoj difterioj kaj skarlatinoj. La avino ofte rakontis, kiel ŝia Vlaĉjo iris ankoraŭ matrikuli sin en lernejon, poste li grimpis kun buboj sur arboj, li falis kaj mortiĝis. En la lernejon li jam ne iris. Ĉiuj kvar etaj infanoj mortis pli frue, ol naskiĝis mia patrino. Ŝi estis anstataŭigonta Miroslavan, kiun sufokis difterio, sed por ke ne trafu ŝin la sama sorto, ŝi ricevis alian nomon, kvankam almenaŭ similan, Milada, kaj oni alparolis ŝin Mildinjo kiel la mortintan.

Panjo estis la plej juna el siaj gefratoj samkiel paĉjo, sed la gefratoj de paĉjo vivis ĉiuj almenaŭ ĝis siaj kvardek du jaroj. Tiom juna mortis la plej amata frato de mia patro Johano. Paĉjo estis la sepa en la vico, li havis tri fratinojn kaj tri fratojn, sed li la sola volis resti en bieno, kie li naskiĝis, kaj mastrumi. La plej aĝa frato Jozefo fariĝis fervojisto, laŭdire por povi senpage vojaĝi tra la tuta Aŭstrio, Franĉjo en la bieno ŝatis nur ĉevalojn, sed tiujn li amis tiom, ke pro ili li fariĝis ulano. Kavalerio ja estis tiam signifoplena kaj parada parto de armeo. Johano ŝatis librojn, li sopiris fariĝi instruisto kaj li ankaŭ fariĝis tiu. Dum la unua respubliko li helpis en Slovakio, kie estis preskaŭ neniuj instruistoj, kapablaj instrui slovaklingve. Antaŭ ol estiĝis Ĉeĥoslovaka respubliko en la j. 1918, do ĝis la fino de la unua mondmilito, estis la instruistojn, tial ili malbone lernis kaj elkreskis el ili nur dratumistoj. Ili vagadis tra la mondo kaj rebonigadis, dratumis vazaron. Iam rompitan krupon neniue elĵetis, oni dratumis ĝin kaj ĝi servis plu. Hodiaŭ oni simple aĉetas novan. Aŭ la infanoj en Slovakio rapide ellernis la hungaran kaj fariĝis el ili hungaroj, kiel tion la tiama registaro deziris. En Bohemio estis tiam iom pli bone.

Paĉjo, la eta Vojteĉjo, hejme estis amato de ĉiuj. Foje li glitumis kun kamaradoj sur fiŝlago kaj la maldika glacio sub li tratompiĝis. Li timis iri malseka hejmen, por ne ricevi batadon, tial li sekigis sin kun kamarado, same malseka, sur forno ĉe najbaroj. Tiuj forveturis al iu edziĝfestoj, hejme estis nur infanoj, inter ili ankaŭ la infanamo de la patro Manjo. Kiom plaĉa estis la varma tuko sur ŝia kapo, nu estis belege...

Sed paĉjo rememoris ankaŭ, kiel vivis dum lia infanaĝo malriĉaj homoj en vilaĝo. Oni nomis ilin helplaboristoj, helpistinoj, stalservistoj. Ili servis ĉe bienmastroj. Stalservisto ne havis sian ĉambron. Li dormis ĉe la ĉevaloj, kiujn li striglis, pajlosternis, kun kiuj li laboris sur kampo. En angulo de la stalo li havis nur pajlosakon, sur ĝi kapkusenon kaj lankovrilon kaj sur la muro du tri hoknajlojn, sur kiujn li pendigis vestojn kaj porvintran surtuton. Ŝuojn ne portis eĉ la infanoj de bienulo, ili kutimis iri nudpedaj ankaŭ aŭtune sur stoplejo kaj vintre sur neĝo. Ili estis pli harditaj ol la nuntempaj infanoj. Dum mia infanaĝo estis jam ĉio alia, precipe en la urbo, kvankam en la malnova Vyšehrad estis ankoraŭ ĉiam sufiĉe da mizero.

La pli aĝa fratino de mia patrino, Anna, en malfeliĉa geedzeco havis tri filinetojn. Ŝia edzo estis rusa legiano, li transvivis pezan vundon de la ventro, eble pro tio li fariĝis acidhumora, la tero estu malpeza al li. Al Anna li edziĝis nur kiam ŝi atendis kun li la trian filineton, la kuzinon Anjo, je du jaroj pli Alan, ol estis mi. Manjo, la plej aĝa filino de Anna, onidire prezentis sin en la unua klaso de baza lernejo: Dryáková, fraŭline Charvátová. Al la Dryáková-knabinoj la avino ankaŭ kondutis favore. Al mi ne, mi havis patron, kiu konsciencie zorgis.

En la jaro 1927 ni en Vyšehrad travivis incendion de la citadelo. Ne ke ni estus rekte ĉe la fajro, sed ni vidis en mallumo la ardan brilon jak fajrerojn, ŝajnis, ke ili ŝprucis al la ĉielo rekte el la tegmento de la kontraŭa domo. Kaj ni aŭdis la trumpetadon de estingistoj, ili veturis al la incendio preter ni. Mi ĝuste estis resaniĝanta el angino, ni ĉiuj tri rigardis tra fenestro.

Antaŭ nia forloĝiĝo en la kvartalon Krč mi okazis mia konkurbatalo kun koĉero. El la balkono mi ofte vidis, kie la kruelaj koĉeroj vipas la ĉevalojn, por ke ili forte ektiru almonte. Ĝis nun elstariĝas en tiu vojkurbiĝo la malalta domo „Ĉe Šefrna“. Ĉevaloj estis mia amo. Ne kurĉevaloj, tiujn mi ne konis, sed ĝuste la larĝkorpaj trenĉevaloj, ekstalonoj... Amare mi ĝemploris pro ili. La pavimo en la kurbiĝo abrupte ascendas, la veturiloj estis alte ŝarĝitaj. Koĉeroj grandparte antaŭe haltis ĉi tie en la gastejo „Ĉe Přemysl“ kaj trinkis iom. Kaj la ĉevaloj poste devis denove ekmovi la pezajn ŝarĝojn. Foje mi kaj paĉjo hazarde troviĝis ĉe tio, ni trinkis limonadon starante antaŭ gastejo. Koĉero apud ni trinkis bieron. El lia boto elstaris vipo. Rapide mi eltiris ĝin, ĝi estis preskaŭ pli alta ol mi. Mi eĉ ne scias, kiel mi kapablis tion, rapide mi ŝovis ĝin en kloak-kradon. Peco ankoraŭ elstaris. La koĉero turnis sin, tuŝis min, sed mi sukcesis la vipopinton fleksi je la krado kaj ŝovi ĝin tra alia interspaco malsupren. Mi flaris de proksime la ŝvitmalsekan kvadratan ĉemizon, jam la koĉero disŝiregos min. Mi ne scias, kia estus mia fino, sed paĉjo haltigis la koĉeron – jak pacigis lin. Do li pagis.

Mi ŝatis ankaŭ Batulan, la hundinon de la najbaroj Ŝvejkovský. Ŝi blindiĝis pli poste, sed longe ŝi vivis, mi priploris ŝin jam preskaŭ plenaĝa.

La familio Ŝvejkovský estis bonaj najbaroj. Vidvino post magistrata oficisteto, sinjorino Ŝvejkovská havis en la aĝo de miaj gepatroj tri infanojn. Fraŭlino Růžena vizitadis kun mia patrino en lernejo unu klason, Jarmila estis je du jaroj pli juna, ilia frato havis la nomon Karel. Kiam ni loĝis en Vyšehrad, mia familio min flankenmetis al la familio Ŝvejkovský, kiam ĉiuj familianoj havis ion neprokrasteban, kion ne eblis plenumi kune kun malkvieta infano. Mi ŝatis iradi al Ŝvejkovský. Mi apartenis al infanoj, kiuj „ne manĝas“. Tio signifas – mia patrino surtabligis antaŭ min abundajn manĝaĵojn kaj pli ofte devigis min manĝi. Foje ni ĉiuj tri estis ĉe Ŝvejkovský kaj tie la tutan societon mi ŝokis per peto:

„Sinjorino Ofoská, ĉu vi ne havas pankrustenon?“

Ĉiuj ekridis kaj la historieto estis longe rakontata. Ĝis hodiaŭ mi ŝatas pankrustojn.

En la kontraŭa alta domo estis en keletaĝo malgranda laborejo, oni iradis en ĝin sur kelkaj ŝtupoj de sur trotuaro. Ĝi estis gurdoriparejo. Sinjoro Kameník incitetis min, li instigis min manipuli tion. Sed la nemoveblaj krankojn ne estis eble ektorni, per la plej granda penado mi kapablis akiri apenaŭ ekfajfon. Luj gurdoj havis sur la supra plato figuretojn, kiuj dum ludado moviĝis kaj dancis. Kiam sinjoro Kameník havis bonan humoron, li cedis al petoj, la pezan kraton li turnis kaj prezentis la tutan spektaklon.

Nun la Vratislav-strato estas tute alia. Antaŭ nelonge mi apenaŭ ekkonis la lokon, kie la laborejo estis, samkiel en preskaŭ ĉiuj apudaj domoj estas malsupre kafejo, vintrinkejo, gastejeto, mi ne scias, kiu el ili estas hejmeca, ĉiuj aspiras esti malnovtempe romantikaj, tute ne gurdo-riparejo. Ĝi estis longajn jarojn dezerta malantaŭ lada rulkurteno. Ĝi ne plu estas...

En la Brika pordego loĝis en malhela loĝejo fraŭlino aŭ eble sinjorino Rézinka Pětnicová. Ŝi iradis tiom strikte zonita en la talio, ke tio estis proverba, oni diris: „Ŝi zonas sin kiel Réznika“, aŭ „Ne tiru strikte la rimenon, vi estos keil Rézinka.“

Inter pordegoj, tuj post la Brika, la Citadelo ne aspektis kiel nun. Setlis tie etĝardenistoj Ni havis luprenitan ĝardeneton, strion, kiu estis supre sur la remparo parte ebena, sed poste ĝi kliniĝis al vojo. Supre inter arboj pendis pendolo. Sub vikariem, kiu tiam estis teretaĝa, staris sur malgranda ebenaĵo „Meduňka“. La malgranda kurbiĝinta personeto, kiu havis ĉi tie kadukan kioskon kaj eble ankaŭloĝejon, verŝajne havis la nomon Medunová, mi ne scias. Neniu al ŝi kaj al la kiosko diris alie ol Meduňka. Sinjorino Meduňka vendis turkan mielon kaj limonadon. De Medunka deflankiĝis de la strato la vojo al korto. Ĝi estis io kiel provinca mastrumaĵo. Ili havis tie longforman loĝdometon, ŝedon, kokinojn kaj alian kortbirdaron. Korto estis nomata ankaŭ la kontraŭa flanko, la loko kontraŭ la vikariejo kaj kapeletoj, kie loĝis la servistaro de kapitulo de Vyšehrad. Tien en la korton ni ne iradis. En la korton ĉe Meduňka jes. Kunvenadis tie la etĝardenistoj, inter ili ankaŭ mia patro.

Paĉjo estis pasia ĝardenisto. Li naskiĝis en vilaĝo ĉe Jičín. Dum kelkaj jarcentoj liaj antaŭuloj estis lokaj vilaĝestroj. Paĉjo ne havis nur tri fratojn, sed ankaŭ tri fratinojn. Ĉiuj volis avantaĝe edziniĝi kaj por tio dum Aŭstrio ili bezonis grandamplaksan doton. En la jaro 1911 la bieno de la avo bankrotis, la maljuna patro iris labori kiel intendanto en fremda bieno kaj tial la plej juna filo Vojtěch ne povis labori sur la heredita grundo, kiel li sola el la gefratoj intencis. Li ekloĝis ĉe sia fratino Božena en Prago, li finis tie la lernejon kaj nevolonte li lernis la profesion de tipografio en presejo. Tio estis tiam bone salajrata profesio, sed malsaniga, ĉar oni laboris en plumbo-haladzo. Kaj li tiom ŝatis la bonodoron de fojno.

En libera tempo dum la tuta vivo li okupiĝis en ĝardeneto. Verŝajne nur pro tio li ĝisvivis naŭdek jarojn, kvankam junaĝe li longe estis supera veneiĝo de plumbo. La tiama presmaniero estis la t. n. varmega, la tipografo sidis ĉe granda maŝino, kiu laŭ frapoj sur alfabetan klavaron elklikis matricojn, kiuj falis malsupren kaj elfandis plumbajn liniojn, kiuj automate viciĝis unu post alia kaj la tipografo forportis ilin en alineoj al presprovado. Infanaĝe mi estis en la presejo kvazaŭ hejme, sed kompreneble ĉiam nur por mallonga tempo. Paĉjo kompostis per linotipo, pli poste per intertipo kaj per monotipo, sed ĉiam per varmega kompostado. La truado de paperbendoj ankoraŭ ne estis eltrovita.

Mi vizitis la elementan lernejon, kiam paĉjo peze malsaniĝis. Sinjoroj doktoroj antaŭvidis finon de lia vivo kaj preparis panjon al tio, ke ŝi estos vidvino. Iu konsilis al ŝi, ke ŝi vizitu la saniganton Mikulášek. Panjo veturis al li. Li tiutempe ĵus transloĝiĝis kaj ankoraŭ ne kuracis. Panjo traatendis la tutan nokton, matene sinjoro Mikulášek vidis ŝin malantaŭ sia pordeto malesperantan kaj akceptis ŝin. Li diris, ke la patron li resanigos, se li precize agos laŭ liaj preskriboj. Ili enhavis ekzemple ankaŭ seriozan mascon de regiono de la galveziko.

Paĉjo havis en la karaktero la precizecon. En la laboro li elstaris tiom, ke dum krizo li restis sen laboro nur mallongan tempon. Li havis tian famon en la fako, ke post bankroto de la malgranda presejo en Vyšehrad, en kiun li transiris el la Písek-pordego, oni akceptis paĉjon ĉe la unua vakiĝo de posteno en la Ŝtatan presejon kaj li laboris tie ĝis pensio, eĉ pli poste li iradis helpi kun malfacilaj alilingvaj kaj tabelaraj tekstoj. Same skupula, konscienca kaj epakta li estis ankaŭ ĉe la obeado de la preskriboj de sinjoro Mikulášek. Li resaniĝis kaj al la plumboveneniĝo li estis poste infektorezista. Kaj verŝajne helpis lin al la alta aĝo ankaŭ la ĝardenistado.

Paĉjo havis la naskiĝjaron 1899, dum la unua mondmilito li atingis dek ok jarojn kaj post mallonga ekzercado li devis al la suda fronto ien al Sopron. Eniri en la legiojn li ne sukcesis, sed en paffajro li unufoje estis. Li gardostaris proksime de tranĉeoj, komenciĝis kanonpafado, li ne moviĝis de sia loko. Eble ili celumis al li, sed malĝuste, trafitaj estis la soldatoj en la tranĉeo. Li ricevis poste militkrucon pro braveco. Neniam li fanfaronis per ĝi al ni infanoj, verŝajne pro la aŭstra ordeno li prefere honos, eksciis pri tio nur la amata pranepo Johanĉjo. La militkantoj de paĉjo estis miaj lulkantoj. Li ankaŭ rakontadis el sia ŝoprona militestado gajajn historietojn kaj diraĵojn. Ekzemple kiel la ĉeĥaj soldatoj imitis la trumpetadon kaj tamburadon:

„Paĉjo hungar', panjo hungar', infanar' hungarar', trararar', trararar'“. Aŭkion instruis dalmatoj al ĉeĥaj soldatoj: „Mankas pano, mankas mono, por dalmato nebezoko.“ Estis pli multaj tiaĵoj, domaĝe, ke la memoro estas sendanka fibrilo.

Post la milito paĉjo denove soldatservis, kvazaŭ li neniam militus. Li estis altstatura, svelta, oni elektis lin por la kastela gardistaro. Kiam ajn ni kune trairadis tra la Kastelo, li montris al ni, kie li atentostaris, kiam preterveturis prezidento Masaryk.

Paĉjo kaj panjo estis fervoraj patriotoj. Ili interkonatiĝis en la grupo de la junularo de Vyšehrad. Paĉjo loĝis ĉe sia pli aĝa fratino Božena rande de la kvartalo Nusle, Vyšehrad estis proksime.

Tradukis Jiří Patera

(Daŭrigota)

František Lazecký al Jiří Karen

Ni aperigas tri leterojn de la ĉeĥa poeto František Lazecký al la komandanta poeto Jiří Karen. Lazecký prijuĝas, kritikis kaj laŭdas la poeziajn provojn de la junulo Karen. En la 1980-aj jaroj ambaŭ poetoj – František Lazecký kaj Jiří Karen – estis membroj de la literatura sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. František Lazecký naskiĝis antaŭ cent jaroj – la 18-an de aŭgusto 1905.

La 29-an de novembro 1941

